

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 191**  
**11. 5. 1924**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,80 sv. fk. por landoj, kies valuto  
sufiĉis maksimume 80%: por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (se anstataŭ pago 0,15 sv. fk.),  
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Prepara konferenco por internacia radio- telefonon interkonsento en Genève 22-23 aprilo

### La radio-telefonio kaj ni.

Tion, kion ni antaŭ ne longe pridiskutis nur teorie — kamparu ET 176 — subite fariĝis realaĵo en la praktiko.

De kelka tempo pliintensiĝas la klopodadoj de praktikaj samideanoj utiligi Esperanton en la servo de l' radiotelefono, kiu sole pere de internacia helplingvo fariĝas vere internacia komunikilo. Ni jam informis pri la fondo de Internacia Radio Asocio (prez D-o P. Corret, Versailles, hon. sekr. Harry A. Epton, London) kaj sciigis en ET 181 ĝian regularon. Ĝis oni ankaŭ fondis specialan esp. gazeton „Radio-Servo“ kun sama celo.

Pluraj intereso-grupoj ne-esperantistaj dume okupis sin serioze pri la problemoj de apliko de internacia helplingvo en radio-servo. Antaŭ ne longe oni ankaŭ sciigis en diversaj gazetoj, ke granda amerika kompanio estus akceptinta ldon por la sama celo. El informetoj al la koncerna organizacio ni sciigis, ke oni fakte konsideris tiun ĉi aferon. Post informo pere de kompetentaj esperantistoj pri la multe pli supera rolo de Esperanto la decido tamen ne estas farita. Se ĝi okazos poste, ĝi sendube nur povos esti por Esperanto kiel oni vidas pli malsupre.

Interlime pli grava paŝo estas farita de speciala konferenco radiotelefona. Je pasko, kiam kunvenis en Genève la reprezentantoj de UEA, de C. K. kaj K. R., samtempe okazis sub aŭspicioj de la Svisa Radioelektra Societo en Genève speciala prepara konferenco por internacia radiotelefona interkonsento, en kiu krom naciaj lingvoj ankaŭ Esperanto estis grandparte uzata de reprezentantoj de eksterlandaj radiostacioj kaj kompanioj. Sur la tagordo estis diskuto pri la aplikado de Esperanto en radiotelefono. La konferenco akceptis tre favoran rezolucion. Ni publikigas hodiaŭ la detalan raporton de tiu ĉi konferenco. Pro ĝia aparta karaktero ĝi ŝajnas esti multe pli grava ol la antaŭaj konferencoj parencaj en Genève kaj en Venezia. Dependas de la lerteco de aktivaj samideanoj laŭcele utiligi la rezultojn de la konferenco. Antaŭ ĉio ŝajnas esti trege necese interesiĝi radio-entreprenojn por aligo al la fondota centro en Genève. Devos aliĝi ne sole ĉiuj foiroj, kun apartaj radio-sekcioj, sed ankaŭ radio-kompanioj kaj similaj entreprenoj. Oni helpu nepran efektivecon de la projekto.

Ni uzas la okazon por dediĉi denove la hodiaŭan numeron ekskluzive al la radiotelefono. Ni publikigas intervjuon kun la direktoro de la Radiostacio en București, artikolon pri instruado per radio, valoran sugeston pri utiligo de radiotelefono dum niaj universaltaj kongresoj, informojn pri radio en Lisono de nia fervora kunlaboranto en San Francisco s-o A. Vinzent kaj tiel interesan kiel detalan artikolon pri la germana rondradio-sistemo. Tiu ĉi artikolo estas skribita jam antaŭ kelka tempo. Ĝia enhavo tamen neniel perdis sian aktualcon. Fine ni enpresas interesajn detalojn el la historio de la radioscienco kaj informaron pri la jura rolo de radiotelefono en diversaj ŝtatoj dank' al afabla permeso de Ilustriata Radio Gazeto en München.

Je la fino ŝajnas al mi ankoraŭ tre necese atentigi pri la neceseco de interkonsenta prilaboro de faka terminaro. Dum la radio-konferenco en Genève oni jam diskutis pri tiu ĉi tre atentinda problemoj. En „Germana Esperantisto“ de aprilo nunjara oni publikigis preskaŭ tute aprobindan liston germanan-esperantan de fakvortoj de radio. Estas dezirinde, ke kompetentaj samideanoj interrilatu kun niaj lingvaj institucioj kaj kun la en Genève antaŭvidita subkomisiono pri starigo de internacia radiotelefona fakterminaro por akceli la kreon de vere internaciaj esprimoj kaj difinoj.

Ni sciigis ankoraŭ, ke la Radio-Rundschau für Alle (Radio-Revuo por ĉiuj) Wien I, In der Burg, Zuckerbäckersteige (Eldonisto Kapitano E. Winkler) ĵus komencas la publikigon de plurlingva radio-fakterminaro kun Esperanto-rubriko. Koncentrigo de la tuta laboro ne nur estas konsilinda, sed eĉ nepre necesa, kiel vidigis la komencaj diskutoj en la konferenco de Genève.

Se ĉiuj interesitaj samideanoj, okupas sin intense pri la diversaj problemoj solvoitaj koncerne Esperanton en la kampo de radio, la ĝenerala enkonduko de Esperanto en radio-sfero okazos baldaŭ.

Mi ne dubas pri tio.

Robert Kreuz.

### Prepara konferenco por internacia radiotelefona interkonsento.

Tiu konferenco solene malfermiĝis je la 5 h. ptn. en la festa salono de Palaco Eynard, mardon, 22 aprilo 1924. Ĉirkaŭ la verda tablo sidis oficialaj reprezentantoj de diverslandaj radiotelefonaj stacioj, societoj kaj kompanioj.

Partoprenis al la konferenco 39 stacioj, societoj, kompanioj aŭ administracioj de radio, de telefono aŭ telegrafo el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Ĉeĥoslovakio, Nederlando kaj Svislando. Inter la reprezentantoj oni kalkulis dekon da personoj sciantaj Esperanton kaj aliajn parolantaj precipe francan, germanan kaj italan lingvojn.

Unue la instrua ministro de la Genève Registaro s-o Mussard salutis la konferencen en la nomo de la Genève Respubliko.

Oni senpacience atendas la grandan ekspozicion pri radiotelefono okazonta en Genève en la fino de majo venonta. La rapida kaj mirinda progreso de tiu nova scienco kaj industrio estas afero plej internacia kaj pro tio ne estas strange, ke oni klopodas nun interkonsenti pri kelkaj gravaj punktoj.

S-o Mussard rakontas, ke liaj kolegoj en la registaro elektis lin por veni hodiaŭ por unu vorto sur la tagordo de la konferenco. Inter la punktoj diskutotaj troviĝas inter aliaj la problemoj de internacia helplingvo por radiotelefono. Nun ĝuste li mem kontrolis eksperimenton faritan dum 2 jaroj en la Genèvej elementaj lernejoj, kie oni instruis devige Esperanton en certaj klasoj. La rezultato lin konvinkis pri la rimarkinda facileco de tiu lingvo, kiun la junaj lernantoj sukcesis skribi kaj paroli post unu vintro kun du lecionoj ĉiusemajne, dum ili tute ne atingis similan sukceson pri aliaj lingvoj malgraŭ kelkajara studado kun pli granda nombro da horoj.

En la nomo de la Genève Registaro li bonvenigas la konferencan kaj esperas, ke ĝi trovos rimedojn por faciligi la pli ĝeneralan kaj ankoraŭ pli sukcesan disvastigon de radiotelefono en la mondo.

S-o Maurice Rambert, prezidanto de la Svisa Radioelektra Akcia Societo kaj delegito de la Romanda Societo Radiofona (stacioj de Genève kaj Lausanne) klarigas la celon de tiu prepara konferenco. La rapida disvastigo de radiotelefono necesigas novajn internaciajn aranĝojn pri apartigo de ondlongoj, helpa uzo de internacia lingvo kaj organizo de internacia centro kaj ligilo inter sendostacioj.

Li bonvenigas la oficialajn reprezentantojn de la Ligo de Nacioj (s-o Hass), de la Labora Oficejo (s-o Boisnier), de la Svisa Ministerio de Poŝtoj kaj Telegrafoj (s-o Calame), li salutas ankaŭ Kolo-

nelon Hilfiker, stabestro de la Inĝeneria Sekcio de svisa armeo, kaj la delegitojn de diverslandaj tre konataj grandaj kompanioj, inter alie Marconi.

Li kore esperas, ke la konferenco povos instigi movadon por baldaŭ alveni al interŝtata konvencio apartiganta la ondlongojn de radiotelefono kaj senfadena telegrafio, por ke la dua ne plu ĝenu la unuan.

Laŭ lia propono la konferenco elektis kiel prezidanton s-on Isbrücker, inĝenerio de la Bell Telefonfabrika Kompanio, delegito de la Nederlanda Radiotelefona Asocio, de la Nederlanda Sciencia Societo por Radiostudado, de la Gazetinforma Radiostacio Vaz Diaz en Amsterdam ktp., kiu diras kelkajn salutvortojn france kaj poste faras tre interesan teknikan alparolon pri la sciencia revolucio efektivigita per la lampoj, nun ebligantaj la tutan radiofonan disaŭdigadon en la mondo en Esperanto.

Li proponis elektii s-on Maurice Rambert kiel honoran prezidanton de la konferenco pro lia laŭdinda iniciala laboro. Tio estas akceptita per aklamoj.

S-o Hass, direktoro de la Trafika Sekcio de Ligo de Nacioj anoncas, ke la speciala subkomitato elektita de la trafika komisiono de Ligo de Nacioj por studi la problemojn de senfadena telegrafio ankaŭ konvinkigis pri la neceseco kunvoki iam interŝtatan konferencon por reviziti la Londonan konvencion de 1912 rilate al multaj punktoj. La nuna rapida disvastiĝo de radiotelefono postulas, ke tiu ĉi punkto ankaŭ troviĝu en la tagordo kaj tial la Ligo de Nacioj plezure ricevos sugestojn aŭ deziresprimojn de la nuna prepara konferenco, kiu reprezentas opiniojn de specialistoj. Tiamaniere estos praktika ligilo inter la klopodoj privataj kaj la oficialaj.

Unu post la alia s-oj Edmonds, reprezentanto de Wireless World de Londono, Saggiori, prez. de Radio Klubo de Padova kaj del. de radio societo lombarda, s-o Piliik, komisaro ĉe Komerc Ministerio ĉeĥoslovaka kaj delegito de la Radioslavia Kompanio, s-o Kreuz, delegito de la Südwestdeutscher Rundfunkdienst A. G. (Radiostacio de Frankfurt) kaj de la radio-sekcio de la foiro de Frankfurt a. M., Inĝenerio Scholze, delegito de la radio-sekcio de la Foiro en Reichenberg, klarigas en Esperanto la situacion, la progreson kaj la malfacilaĵojn de radiotelefono en sia respektiva lando, kie ankaŭ ĉiuj pezas, ke oni ĉesigu ĝenaĵojn per ia internacia konsento. Rezolucioj de la konferenco povus tre utili al ili por instigi grandan movadon de publika opinio kaj petkskribon al registaro.

S-o Reut, prez. de la Genève sekcio de Svisa Radio Klubo, prezentas la proponon, kiu servu kiel bazo por la morgaŭa diskuto pri apartigo de ondlongoj, kaj fervore pledas por la rajtoj de la amatoroj, kies eksperimentado tiom progresigis la tutan aferon de radiotelefono.

D-o Privat, membro de la Internacia Jurista Komitato pri Radio-Telefonio kaj delegito de la Svisa Komisiono por Reguligo de Senfadena Telefonio, prezentas proponon pri internacia organizo de radiostacioj por interŝanĝi siajn horarojn kaj defendi la komunajn interesojn.

La kunsido finiĝas je la 5 h. kaj la delegitoj fotografiĝas sur la teraso de la Palaco. Oni rimarkis inter la partoprenantoj s-on Chaponnière, reprezentanto de la kompanio Marconi, s-on Filiâtre, direktoro de Internacia Ligo de PTT en Paris, s-on Rambal, vicprez. de la Svisa Radio Klubo, d-on Merz, direktoro de „Radio“ en Bern ktp.

### Urbeŝtra akcepto.

Mardon vespere, en la festalonoj de Palaco Eynard, la Genèva urbeŝtraro solene akceptis la diverslandajn delegitojn invitinte ankaŭ la membrojn de la Genèva Radio Klubo, la delegitojn de K. R. kaj UEA kaj la membrojn de la Genèva Grupo „Stelo“.

Bonvenigante ĉiujn invititojn, la urba administranto s-o Marius Sioessel ĝojis pri la progreso de radiotelefonio kaj akceptigis la necesecon de neŭtrala helplingvo por ĝin faciligi.

Tiu lingvo ekzistas: Esperanto vivas kaj utilas!

Respondis esperante la prezidanto de la konferenco radiotelefona inĝeniero Isbrücker, gratulante la urbon de Genèvo pri ĝiaj internaciaj interresoj kaj celadoj.

### Apartigo de ondlongoj.

La prepara konferenco por internacia radiotelefona interkonsento komencis merkredon matene je la 10 h. la efektivan diskutadon de la grava temo de apartigo de ondlongoj inter radiotelefonio kaj senfadena telegrafo. Treege vigla fariĝis la diskutado inter la partianoj de precizaj ciferoj kaj la prudentuloj preferantaj lasi la detalojn al posta interŝtata konferenco. Ili tenis sin momente nur al esprimo de ĝeneralaj deziroj por unuigi ĉiujn klopodojn kaj akceli la necesan oficialan kunvokon de interŝtata konferenco ĉe la Ligo de Nacioj aŭ per Universala Telegrafa Unio.

La Genèva sekcio de Radio Klubo montriĝis la plej fervora por la unua tezo kaj ĝiaj proponoj estis disdonataj dulingve, france kaj esperante, al ĉiuj delegitoj.

Kontraŭe, la registaraj reprezentantoj subtenis energie la duan punkton. Ankaŭ naskiĝis tre vivoplena inter-argumentado pri la rajtoj kaj meritoj de la amatoroj, kies pionira eksperimenta laboro tiom progresigis la tutan radio-sciencan.

Rimarkinda estis la uzo de la lingvoj dum la diskutado. 50% okazis france, 50% esperante. France parolis ĉiuj svisaj kaj francaj delegitoj, dum preskaŭ ĉiuj aliandanoj parolis esperante. Nur unu- aŭ dufoje aŭdiĝis germana kaj itala lingvoj. La rapida esperanta inter-argumentado treege impresis la aliajn delegitojn.

Post ofta interveno de s-oj Reut, prez. de Genèva Radio Sekcio, Rambal, vicprez. de la Svisa Radio Klubo, inĝeniero Dufour, inĝeniero Isbrücker, inĝeniero Rambert, s-o Kreuz, del. de la Frankfurta Radio-stacio, inĝeniero Leonello Boni, prez. de la Itala Societo de Radio Komunikado, inĝeniero Stromboli, membro de la Itala Elektroteknika Societo, s-o Calame, oficiala del. de la Svisa Poŝta kaj Telegrafa Ministerio, inĝeniero Scholze, del. de la Radio Sekcio en Reichenberg, la jena rezolucio estis fine akceptata por interkonsentiĝi ĉiujn vidpunktojn:

### Deziresprimo I.

La prepara konferenco por internacia interkonsento pri radiotelefonio en Genèvo la 22 kaj 23 aprilo 1924.

Konstatante ke la Londona konvencio de 1912 kaj la interkonsento de Washington de 1920 ne plu sufiĉas kaj antaŭas gravajn mankojn por la nuna disvastigo de radiotelefonio.

Esprimas la dezirojn, ke nova interŝtata konferenco estu tre baldau kunvokita por ripari tiujn mankojn kaj doni al la radiotelefonio la eblecon disvolviĝi kiel eble plej senbare en la intereso de tutmonda popola kulturo kaj ĝenerala informado, kaj rekomendas:

1. ke oni rezervu certajn kampojn de ondlongoj ekskluzive al la radiotelefonio disaŭdigo, kaj ke ili estu tre nete apartigitaj de la kampoj dediĉitaj al radiotelegrafo;

2. ke pro la konsiderinda helpo alportita de la amatoroj al la disvolvo kaj progreso de radiotelefonio iliaj rajtoj estu konsiderataj kaj certaj kampoj estu rezervataj al ilia eksperimentado;

## La germana rond-radio (Rundfunk).

De poŝtkonsilisto Thurn, Berlin.

En tiu ĉi artikolo estas priskribata la organizo de la germana sendrata rondradio (rond-radio) por informado kaj amuzo: estas komencitaj la teknikaj instrukcioj por la konstruado de akceptiloj por sendrata rondradio kaj la kondiĉoj por la disvolvado de la aparatoj kiel ankaŭ por la pertopreno de la informiga kaj amuziga rondradio sendrata.

La radiotelegrafo en Germanujo ĝenerale dum la lastaj jaroj sukcese konkurencis kun la drato-kaj kablo-telegrafoj tiel en la interkomunikado kun la transmara eksterlando kiel ankaŭ en Eŭropo kaj en la intergermana interkomunikado. Sur la kampo de la samtempa disvastigado de sciigoj speciale al pli granda interresularo la sendrata telegrafo kaj telefonio akiris bonegan pozicion, kiu tute ne povas esti forkonkurata de la drato-telegrafo kaj telefonio.

Pri la organizo de la germanaj „Rundfunk“-instalaĵoj estu permesate doni kelkan priskribon.

Ŝi diferencas en Germanujo pri la telefonio-„Rundfunk“ 3 diversajn specojn. Unue estas citinda kiel plej eminenta servo por nia ekonomia vivo kaj de pli grava valoro la sendrata priekonomia rondraportservo (Wirtschaftsdruckspruchdienst), ĉe kiu per 10-kilovata tubsendilo (Königs-wusterhausen) — kiu estas serpece alparolita de la societo „Ei-dienst“ (rapidraporto) en Berlin — estas disvastigata per la 4000 m-endo sciigoj priekonomiaj al la partoprenantoj (abonantoj) en pli ol 500 lokoj de la germana regno. La akcept-aparatoj estas neŝanĝigeblaj (firme) regulitaj je ilu ĉi ondo.

La regna poŝtministerio plue por la celoj de la „Rundfunk“ kontraktis kun la „Deutsche Stunde“ (Germana Horo), asocio por sendrata instruado kaj amuzigado, kun limigita garantio (K. l. g.), Berlin SW 7, Brunnenstr. 2, per kio en Germanujo — escepte en Bavarujo — estas aranĝata ĝenerala „Rundfunk“, per kiu al plej vastaj randoj de

3. ke oni rezervu la uzon de malkontinuaĵ (dempataj) ondoj ekskluzive al signaloj de danĝero de ŝipoj kaj hor-signaloj;

Petas la Ligo de Nacioj kaj la Universala Telegrafa Unio, ke ili faru ĉion eblan por akceli la kunvokon de la necesaj konferencoj, se eble tutmonda, kaj, se ne eble, almenaŭ eŭropa.

Insigas ĉiujn radio-organizaĵojn, ke ili kreu publikan opini-movadon kaj petskribu al sia registaro, por ke ĝi intervenu en Genèvo kaj en Bern por kunvokigi la konferencojn.

### Uzo de Esperanto kiel helplingvo radiotelefona.

Poste la konferenco diskutis la duan punkton de sia tagordo, nome la uzon de Esperanto kiel helplingvo por radiotelefona disaŭdigo.

La reprezentanto de Wireless World, s-o Edmonds, kiu paroladis en la Londona Radio-stacio la 7 majo pri la progresoj de radiotelefonio en Anglujo, prezentis raporton pri la ĝisnuna uzado de Esperanto.

Li anoncis, ke la Brita Brodkasta Kompanio, kiu administras ĉiujn anglajn radiostaciojn, jam ekuzis tiun lingvon je diversaj okazoj kaj ankaŭ por disaŭdigi la paroladon de la Reĝo ĉe la ekspozicio de Wembley, tiamaniere, ke ĝi povu esti komprenata en la tuta mondo.

Laŭ enketo de tiu kompanio oni lastatempe aŭdis kvardekda esperantaj radiotelefona disaŭdigoj el 7 malsamaj landoj:

Granda Britujo	9
Usono	6
Kanado	5
Rusujo	6
Ĉeĥoslovakio	5
Svislando	6
Franĉujo	3

Kial Esperanto estas uzata preferate al iu simila sistemo? Ĉar ĝi estas nepre la plej disvastigata kaj eĉ la sola praktike utiligata en ĝenerala vivo. Alia kaŭzo estas ĝia rimarkinda aŭdoklareco, kiu plej evidentiĝas per radiotelefona uzado. Ankaŭ tial la Brita Sciencia Asocio ĵus oficiale rekomendis Esperanton, por ke estu nur unu mondlingvo uzata.

S-oj Pitlik kaj Scholze, ĉeĥoslovakaj delegitoj, montris tiamaniere la turisma ministerio kaj specimaj foiroj de ilia lando akcelis sian eksterlandan propagandan organizante radiotelefonajn disaŭdigojn per Esperanto. La sukceso estis granda, kaj ili ricevis multnombrajn gazetartencojn de ĉirkaŭe 8 diversaj landoj.

Inĝeniero Leonello Boni, prez. de la Itala Societo de Radiokomunikado, parolante en itala lingvo, transdonas instrukciojn de sia societo subteni la alprenon de Esperanto kiel radiafona helpla mondlingvo. Li mem esprimas sian intereson vidante la uzon de Esperanto dum la konferenco. Estus rekomendinde, ke ĉiuj radiostacioj regule unu- aŭ dufoje ĉiusemajne, je fiksal tagoj, donu internaciajn informadojn en Esperanto kaj ankaŭ organizu kursojn pri Esperanto en nacia lingvo.

S-o Kreuz anoncas, ke li ricevis instrukciojn de la Frankfurta Radio-stacio subteni ĝuste la saman ideon, ĝi estas preta mem efektiviĝi ĝin starate.

Kolonelo Hilflker, stabestro de la inĝeniera fako de la svisa armeo, parolante france, esprimas sian surprizon kaj admiron pri la flua maniero en kiu diverslandaj delegitoj rapide interdiskutas en Esperanto pri teknikaj temoj. Antaŭ tiel fortpruva demonstracio oni povas nur konstati kaj laŭdi la utilecon de Esperanto ne por anstataŭi naciajn lingvojn, sed kiel helpa mondlingvo, kiu ni unuafoje aŭdis dum la konferenco, kun plena konvinka efiko.

S-o Rambert, del. de la Romanda Societo Radiofona, kaj s-o Chaponnière, reprezentanto de

la popolo estas havigotaj bona amuzigado kaj instruobloj tiamaniere, ke per la sendrata telefono al ĉiuj partoj de loĝantaro, kaj ne nur al la riĉuloj, al kiu la instalaĵo de propra akcept-aparato estas ebla, havu okazon aŭdi per sendrata vojo paroladojn de arta kaj amuziga enhavo.

La „Germana Horo“ aranĝas en ĉiuj lokoj, kie estas sufiĉe da intereso, per la sendrata telefono publikajn prezentaĵojn vizioblajn de ĉiuj ajn kontraŭ pago de sumo por eniro. Por tiu ĉi celo la akcept-aparatoj estas armataj kun intensigiloj kaj laŭparoligaj telefonoj, por aŭdigi la prezentaĵojn samtempe al pli granda aŭskultantaro. La tubsendilo (5 kv.), kiu estas disponigita en Königs-wusterhausen per tiu celo de la regna telegraf-administracio, sufiĉas trans tuta Germanujo. La akiro de la sciigoj estas alero de la „Germana Horo“. Nur tiuj sciigoj estas permesataj por disvastigo, kiu estas permesata de unu el la ekzamenaj oficejoj, kiuj estas organizataj de la interŝtata regnal kaj ŝtataj oficejoj. Komence la disvastigo de politikaj, aktualaj sciigoj, precipe politika propagando ne estis permesata. Intertempe oni mildigis tiujn kondiĉojn kaj la radio-interesatoj bataŭas por plej ebla libereco.

Al la societo estas permesate uzi kiel ricev-aparatojn nur aparatojn, kiuj estas konformaj al la teknikaj kondiĉoj de la regna telegraf-administracio, kontrolstampaĵ kaj provizitaj kun aĉesto. La ricev-instalaĵoj povas esti firme instalitaj aŭ provizore instalitaj kaj devas esti servataj de dungito aŭ komisito de la societo. La regna telegraf-administracio rezervas al si la rajton alcesi aliajn entreprenojn por praktikado de sama instalaĵo por celoj de sendrata rondradio.

La plenumo de tiu ĉi plano renkontis malfacilaĵojn en la unua tempo laŭ tiel ke la disponeblaj laŭparoliloj ne sufiĉis. Sed intertempe la germana fekundistoj (Telefunken, Huth, Lorenz, Seibt) sukcesis konstrui laŭparolilojn, kiuj por tiel grandaj ejoj estas konformaj al nepraj postuloj. Tamen ankaŭ per tiuj ĉi laŭparoliloj la redono de la lingvo ankoraŭ tute ne estas senripoĉa, ĉu la fonsono de la transigo de muziko estas tre bona. Ĉiuokaze komparprovoj kun la plej bonaj eksterlandaj laŭparoliloj atestas, ke la germanaj produktaĵoj ne bezonas timi la komparadon.

la Marconi Stacio en Genèvo, konstatas la grandan sukceson de la Esperanto-kurso, sekvata de granda nombro da personoj en multaj urboj kaj vilaĝoj, norde kaj oriente.

Post lego de kelkaj leroj de radiotelefonaj kompanioj el Francujo, Anglujo, Germanujo, Italujo kaj Ĉeĥoslovakio rekomendataj al la konferenco la alprenon de Esperanto kiel helpa mondlingvo, la jena rezolucio estas unuanime akceptata:

### Deziresprimo II.

La prepara konferenco por internacia interkonsento pri radiotelefonio en Genèvo 22-24 aprilo 1924.

Konstatante, ke la radiotelefonio disvastigas la homan parolon trans ĉiuj limoj kaj renkontas la barilon de la diverslingveco,

Opinias urĝe necesa la uzon de helpa internacia lingvo por tiu parto de la brodkastado, kiu celas eksterlandon. Gratulas la radiostaciojn, kiuj jam komencis brodkasti en Esperanto en Eŭropo kaj Ameriko aŭ kiuj menas disaŭdigi kursojn pri tiu lingvo.

Rekomendas al ĉiuj radiostacioj regulan momentan brodkaston en Esperanto almenaŭ unufoje ĉiusemajne, je difinita tago, kaj kio eble disaŭdigi de Esperanto-kurso, ĉar tiu lingvo montriĝis facile, klare aŭdebla kaj jam disvastigata inter aŭdantoj de ĉiuj landoj laŭ konsiderinda proporcio.

### Internacia Centro de Radiotelefonaj Stacioj.

Merkredon posttagmeze je la 4 h., inĝeniero Rambert raportas pri la neceseco starigi ligilon kaj centron inter la radiostacioj diverslandaj, tute speciale por intersanĝi horarojn; ankaŭ estas necese elekti ian konstantan komisionon kiu daŭrigu la instigan laboron de la konferenco por akceli kunvokon de interŝtata kunveno.

S-o Kreuz, kiel reprezentanto de la Radio Sekcio de la Frankfurta Foiro, akcentas pri la komerca flanko de la tuta afero kaj informas, ke nun la foiroj pli kaj pli interesiĝas je elmontrado de radiotelefonaj aparatoj ktp. La Frankfurta Foiro ekz. nun havas apartan radiofakon. Por finance ebligi la starigon de Centro, oni povus ne nur peti kotizojn de ĉiuj radio-stacioj sed ankaŭ aliĝon de gravaj kompanioj.

Inĝeniero Chaponnière akcentas la gravecon de horarinterŝanĝo kaj s-o Edmonds el London rekomendas, ke la Centro estu fiksat en Genèvo pro la sidejo de la Ligo de Nacioj. Tion subtenas inĝeniero Boni el Ferrare pro samaj motivoj kaj ankaŭ inĝeniero Stromboli el Genova.

Unuanime oni voĉdonas la jenan rezoluciojn: „La konferenco komitas sian estraron formi plenuman provizoran komitaton por daŭrigi la klopodojn de la internacia interkonsento pri radiotelefonio, kaj fondi permanentan ligilon inter la elsendantaj societoj, la kompanioj kaj radiotelefonaj ĵurnaloj, kun centro en Genèvo, sidejo de la Ligo de Nacioj.“

### Teknika vortaro.

Poste tre interesa kaj tre vigla diskutado okazas, precipe en Esperanto, pri la problemoj de Internacia Centra Komitato Esperantista, s-o Won Kenn energie protestas kontraŭ la enkonduko de senutilaj novaj radikoj, kiel brodkastado, dum ĉiuj lingvoj, Esperanto same kiel la fina, povas trovi en sia propra fundamento la necesajn elementojn por kunmeti la taŭgan vorton. S-o Calame, oficiala delegito de la Svisa Poŝta kaj Telegrafa Ministerio en Bern, subtenas tiun vidpunkton rilate al la franca lingvo kaj informas, ke pluraj societoj skribis al la federala administracio por insiti favore al la vorto „Radio-diffusion“ (en Esp.: Radio-disaŭdigo).

Poste oni ankaŭ interdiskutas pri la plej bona maniero esprimi la ideon de fajreraj malkontinuaĵ ondoj. Inĝeniero Isbrücker preferas la vorton „dempataj ondoj“, dum inĝ. Stromboli preferas

De ankoraŭ pli granda intereso por la ĝenerala publiko certe estas la enkonduko de loka amuziga kaj instruiga rondradio sendrata, al kiu estas alastata la instalaĵo de privataj ricev-aparatoj por senpera akcepto de ĝeneralaj sciigoj de instruiga kaj amuziga enhavo. Por la celo de tiu ĉi entrepreno la regna telegraf-administracio en kelkaj lokoj de la regno, kie troviĝas sufiĉe da abonantoj por tiu ĉi servo, starigos kelk funkciojn pli malgrandajn telefontendilojn kun sendforto proksimume 100 km, de kiuj ĉiuj estas provizitaj la ricev-aparatojn de destinita regiono almezurita al ĝia sendforto; la ondoj estas tiamaniere elektataj, ke recipoka ĝenado de la unuopaj sendiloj ne povas okazi. Inter tempo oni starigis unu sendilon por Berlin kaj la markgraflando Brandenburg, unu sendilon en München por Bavarujo, plie po unu sendilon en Frankfurt/Main, Stuttgart, Leipzig kaj Hamburg, pliaj sendiloj laŭbezono estas starigotaj en Breslau, Königsberg, Dresden ktp. Kiel tempoj por sendado estas disponeblaj en la unua tempo 4 horoj tage (proksimume de la 6 h. ĝis 10 h. pt.).

Pri la ricev-aparatoj estas postulataj specialaj teknikaj kondiĉoj; precipe la ondoamplseko estas limigata, sed tamen tiel granda, ke sufiĉe granda nombro da ondoj estas libera. La kondiĉoj estas jenaj:

1. povas esti uzataj detektor- kaj aŭdion-akceptiloj kun sekvanta ondoamplseko:
    - a) Ondoamplseko de 250 ĝis 500 metroj kun selektiveco, kiu respondas al normala primara ricevilo;
    - b) Ondoamplseko povas esti plialtigata ĝis 700 metroj, se la selektiveco almenaŭ en la limoj de 500 ĝis 700 metroj respondas al normala sekundara ricevilo.
  2. Pri la riceviloj kiu estas armataj kun aŭdono devas esti certigite, ke ili ankaŭ ne ekfunkcios kun pli altigita ondo- kaj varmeggiga tensio.
  3. Devas esti certigite, ke per aldono de aliaj ondo-reguliloj, sen ke la ricevilo estas malfermata, ne okazas ŝanĝo de la ondoamplseko.
  4. La ricevilo devas esti plombebla.
- Ĉiu germana firma estas rajtigita, fabriki aŭ vendi tiujn aparatojn, kiuj estas permesataj por la instruiga kaj amuziga rondradio sendrata, kondiĉe, ke ĝi kon-

„amorfizataj ondoj“. Kiel neutrala observanto. s-o Rambaĵo esprimas preferon por la radio „Demp“, laŭ li pli oportuna kaj pli internacia.

La tuta afero estu referota al lingva kaj teknika aŭtoritato.

**Starigo de Internacia Centro.**

Post diskuto inter multaj delegitoj oni akceptas la ĵenan rezolucion prezentitan de D-o Privat kaj subtenita de s-o Edmonds:

„La konferenco konstatas la laboron jam faritan de la Internacia Radio Asocio, kies prezidanto estas s-o Pierre Corret en Versailles, kaj sin turnas al ĝi kun la peto akceli la preparon de la teknika terminaro por la senfadena telegrafio kaj telefonio interkonsente kun la asocio por teknika vortaro de la esperantista organizatio.“

S-o Grenkamp, simpla pola ĉeestanto, petas permeson plendi antaŭ la Konferenco pri la absoluta malpermezo ekzistanta en kelkaj ŝtatoj, kiel la sia, kontraŭ tiuj privata uzo de senfadena telefonio eĉ por nura amatora aŭskultado. Aklame la konferenco alprenas lastan deziresprimon por respondi al la petito:

„La konferenco esprimas la deziron ke kelkaj ŝtatoj, ankoraŭ malpermesantaj la uzon de radiotelefono, bonvolu rekonsideri sian decidon kaj permesi la amatorajn ricevilojn.“

La prezidanto inĝ. Isbrückferm faras la konferencon je 5 30 h. gratulante la delegitojn pri la bona laboro plenumita.

Por publika aŭdigo ĉe Radio Klubo Genève merkredon vespere je la 9 h., ĉe la Genève sekcio de la Svisa Radio Klubo en la granda salono de l' „Office de l'Industrie“, multnombra ĉeestantaro premiĝis por aŭdi kelkajn adiaŭ-paroladojn.

S-o Reut, prezidanto de la gastiganta klubo, salutis la eksterlandanojn kaj ĝojis pri la bonaj rezultoj de la konferenco. Respondis en Esp. s-oj Isbrückfer, Edmonds, Stromboli, Kreuz kaj Delenoue. Poste per laŭparolilo oni aŭdis en la kambrego la Genève-an radio-stacion de Cointin, kiu dissendis esperantajn paroladojn de s-oj Wadhams, Pitiik, Saggiari, Kenn kaj Grenkamp. Je la deka oni aŭdis koncertojn el Paris, London, Bournemouth, New Castle kaj je 10,55 h. el London la britan himnon (ĉi tiu levigis la aŭdantaro por honori la anglajn delegitojn).

Poste aŭdigis la voĉo de la angla reĝo, kies malena parolado anĝis estis kaptita per gramofono. Bedaŭrinde tiu gramofona reaŭdigo el London estis tre malklara, ankaŭ pro la troa unusilabeco de la angla lingvo. Kontraŭe la aŭdantaro poste tre klare aŭdis la Esperanto-tradukon, kaj multaj rekonsideris tre bone la voĉon de s-o Epton el London.

La traduko estis stenografiata de s-o Kreuz (Stolze Schrey) kaj D-o Privat ĝin senpere retradukis france por la aŭdantaro, kiu montris sin tre interesita pri la iura afero. Tiamaniere la telegrafegentejo kaj ĵurnalistoj iuj havis bonan resumon pli plenan ol per la vesperaj depeŝoj.

Ĵaŭdon posttagmeze el la Genève-a radio-stacio ankoraŭ parolis en Esperanto pri la konferenco D-o Privat, s-o Edmonds kaj s-o Kreuz, kiu atentigis pri la granda progreso de la radio-industrio, pruvita ĉe la Frankfurta Foira Fako, ĉefe subtenita de la Frankfurta Radio Stacio.

**El la historio de Radio.**

Antaŭuloj de Hch. Hertŝ.

Estas konata fakto, ke la esenca fundamento por la radioapliko estis trovata de germana sciencisto kaj fizikisto Heinrich Hertŝ, kiu en siaj prelegoj en la universitato de Bonn sciigis siajn eksperimentojn. Li tamen ne estis konscia pri la perspektivo de sia eltrovitaĵo. Li ne plu sukcesis utiligi la eltrovon. Nur postaj eksperimentistoj, en unua vico Marconi, sukcesis perfektigi kaj popularigi la radiosciencon. De post tiam ĝi antaŭenmarŝas senhalte.

Sed ŝajnas eble strange, ke la genia eltrovinto Hch. Hertŝ havis antaŭulojn. Tio tamen estas fakto.

Jam en 1858 C. A. Steinheil faris eksperimentojn por telegrafi sendrate inter du stacioj, post kiam li konstatis la eblecon telegrafi per unu sola kondukta drato. Li sukcesis prui la eblecon je distanco de 50 futoj.

Morse faris similajn eksperimentojn. En 1842 kaj 1844 li kondukis la elektron tra kanalo 80 futojn larĝa. Je ambaŭ kanalbordoj li kondukis dratojn en la akvon, je kies fino estis metalplatoj. Unu el la dratoj estis en kontakto kun baterio, la alia kontaktiĝis kun galvanometro. Morse konstatis la kondukivecon de la akvo kaj influigon elektran de la galvanometro.

En 1845 la anglo Wilkens faris similan eksperimenton. Li provis produkti signojn inter du paralele etenditaj dratoj pere de elektromagneta indukto. La eksperimentoj estis sukceshavaj.

Lindsay (Anglujo), Bonelli (Italujo), Douat Bouchot (Francujo) kaj Gintel (Aŭstrio) faris similajn sukceshavajn eksperimentojn.

En 1852 la anglo H. Highton komencis 20-jaran eksperimentadon, similan al Morse. La bonaj sukcesoj sekvigis aplikon de la sistemo en Hindujo.

Ankaŭ en 1870 okaze de la okupacio de Paris oni provis sendratan interligon. La kapitulaco de la urbo finigis la interesan eksperimentadon.

La plej sukceshava eksperimentisto en la longa vico estis Hughes, la eltrovinto de l' mikrofono kaj de la industria pesilo. Per sia mikrofon-ricevilo li konstatis la estadon de elektraj ondoj je la distanco de 450 jardoj (410 m).

Towbridge en Cambridge (Usono), C.A. Brown, Willoughby, Smith, Edison, Phelps kaj Gilliland (1858) faris pluajn sukcesajn eksperimentojn.

La unuan patienton por sendrata telegrafio ricevis la amerikano A. E. Dolbear en 1852.

En 1854 ĝis 1893 W.H. Preece faris eksperimentojn en Anglujo. Li provis sendrate interligi du lumiturojn.

Menciindaj estas ankoraŭ la provadoj de Nicola Tesla, W. kaj E. Rathenau, H. Rubens, Strecker.

En 1898 la franca fizikisto Maiche sukcesis transigi signalojn je distanco de 7000 metroj.

Interligilo inter la telegrafio per indukto kaj de telegrafio per elektraj ondoj estas la sistemo de Lodge.

Pluajn eksperimentojn faris la fizikistoj Oring kaj Armstrong. La franco Ducretet okupis sin speciale pri sendrata telefonio.

Oni vidas el tiu skizo, ke la genia eltrovinto Hertŝ havis antaŭulojn. Al ili kaj al li speciale ni ŝuldas la disvolvigon de la radio-scienco. Sen ilia laboro la radio-scienco eble nur estus imaga fenomeno anstataŭ miriga realeco. Kaj la

plejparto de la homaro uzas radion, neniel konsiderante la penon vojon de la eltrovado. Realismo akcelanta la perein de la mondo! R. Kr.

**Esperanto — Radiolingvo.**

Vizito ĉe s-o inĝ. Giurgea, direktoro de Radiostacio en Bucureŝti.

Leginte la komunikon en la esp. gazetoj pri la esp.-lingva parolado de s-o A. Pitiik en Praha, la estraro de Rumana Esp. Societo tuj interesiĝis, ĉu estos eble aŭskulti ĝin ankaŭ en Bucureŝti? Kun s-o kapitano D-o Josif, vicprezidanto de RES, ni faris viziton ĉe la Centra Radiostacio, kie la direktoro, s-o inĝ. Giurgea, tre afable proponis al ni la inviton por aŭskulti tiun paroladon, pruvon de la grava rolo de Esp. en la radio-sfero. Kun bedaŭro ni informiĝis, ke la ondoj de la ĉeĥoslovaka stacio estos iro malfortaj por esti aŭdeblaj tie ĉi, trans la Karpatoj. Tamen, tiu vizito estis por ni tre utila, ĉar en la persono de la s-o direktoro ni trovis ne nur amikon de Esp., sed samideanon malnovan, lernintan Esperanton kiel studento antaŭ 30 jaroj en Paris.

En lia oficejo, super la skribotablo, sonanta funelo elstaras el la muro: la radiotelefono aŭskultilo. Parolante pri nia lingvo, s-o direktoro memorigas pri la unuaj tempoj de nia movado, pri la fondo de la parisa esp. presejo, pri la komencaj malfacilaĵoj kaj esperoj. Subite li ekstaras, levas sian manon al la sonanta aparato, kaj en esp.-a lingvo li diras: „Tra la mondo iras forta voko. Jen estas la forta voko, pri kiu kantis la Majstro.“ Kaj li konsilas al ni, ke ni petu niajn tutmondajn samideanojn: alian fojon ili uzu pli grandan elektran forton, por ke tiu voko la mondon trafranta estu vere forta kaj vaste aŭdebla.

Cetero li nin konsolas: la aparatoj estas je nia dispono, kaj kiam ni volas, ni povas aranĝi esp.-lingvan paroladon por la eksterlando. Dum la nuna prinftempo oni instalos la ŝtatajn radiostaciojn en ĉiu pli grava urbo de Rumanio, kaj do baldaŭ ni havos la eblecon eĉ pli ofte alparoli niajn diversurbajn samideanojn.

Rigardante en la vastan perspektivon, kiun al ni malfermas la providenca renkontiĝo de tiuj du mirindaj eltrovoj: radiotelefono kaj Esperanto, ni ne povas dubi pri tio, ke nia lingvo baldaŭ fariĝos la nepre bezonata, bonege taŭga: radiolingvo. A. C.

**Instruado per Radio.**

La Eduka Departemento de Usono estas nun okupita pri la efektivigo de vasta plano, laŭ kiu la amerikaj rondradiaj stacioj estos laŭplane metitaj en la servon de edukado. Oni deziras doni per radiotelefono vago regulan instruadon al pli ol 2 milionoj da infanoj, kiuj pro la situacio de sia loĝloko ne havas la eblon viziti lernejon. Tio estas ebla sen iaj malfacilaĵoj kaŭze de la granda disvastigo de radiorecevilaj ĝuste en la vilaĝoj ĉe farmistoj. La sama organizacio estos utiligita por aldona klerigado de instruistoj per prelegoj pri pedagogiaj demandoj de ĉiu speco; tiel oni volas zorgi pri perfektigo de instruistoj, kiuj malofte aŭ neniam havas la eblon viziti la centrojn de edukado. — En pli malgranda mezuro agas simile instruante la anglaj rondradiaj stacioj; ili enkondukis nun en sian programon la lernadon de lingvoj laŭ la antaŭe anonciataj libroj, instruante ĉiutage po 10 minutoj la lingvojn francan, hispanan, germanan kaj italan. Tiu ĉi novaĵo trovis grandan aprobon. B. A., Madrid.

sentis la de la regna telegrafadministracio fiksiatajn kondiĉojn. Precipe ĉi tiu firmo, estis devigata pagi kiel aldonitan unuopan sumon de 2500 germanaj markoj (multobligita per la proporcia nombro per la prialkaŭdo de la teletempoj en interrilato al la eksterlando valorante je la tago de pago) por la al la regna telegrafadministracio kaŭzitaĵoj kostoj por la disponigo de la sendinstaloj, kiujn tiu ĉi, konsiderante la minacan ekonomian situacion ĉe la regno, kompreneble ne mem povas pagi. La akiro de ricev-aparatoj do ne estas necesa kiel en Anglujo por destinitaj socioj, kiuj posedas sendstaciojn, eĉ ili povas esti havigataj en libera komerco, ĉar la regna telegrafadministracio mem funkcigas la sendstaciojn. — Por fabrikado kaj vendado de riceviloj por sendrata radiotelefono en Germanujo (escepte Bavarujo) la regna telegrafadministracio jam allasis pli ol 40 firmaojn, kiuj estas publikigitaj en la nove aperinta revuo „Der Deutsche Rundfunk“ („La Germana Sendrata Radiotelefono“) de la personoj interesataj pri la germana „Rundfunk“, multnombraj pliaj firmaoj intertempe petis permeson, tiel ke la rondo supozeble en pjet mallonga tempo plivastigos.

Por la ekzameno kaj ŝtampigo de la riceviloj por sendrata radiotelefono kaj de la rezervaj partoj la liverfirmo devas pagi al la regna telegrafadministracio kotizon, kies alieco dependas de la speco de konstruo kaj sumigas laŭ aparataro je 10 050 ĝis 7 — markoj de fundamenta valoro. Per la ekzameno kaj ŝtampigo de la riceviloj por sendrata radiotelefono kaj rezervaj partoj la telegrafadministracio tamen ne garantias (1) la borteo de ilia konstruo, same ne pri tio, ke eble okazis neobservo de patentoj ĉe la konstruo de la riceviloj kaj de la rezervaj aparatoj. La regna telegrafadministracio principe rifuzas ĉian partoprenon pri la demando priapienta. Por ĉiuj sekvaj devenantaj el okazitaj reobservoj de patentoj, inkluzive tiuj por la posedanto de tia ricevinstalaĵo por sendrata radiotelefono estas respondoj pri la ĉi tiu rilato la koncerna liverfirmo kaj ĉiuj aliaj iataj la patentistoj kaj garantiindaj oficejoj. La vendo de riceviloj por sendrata radiotelefono kaj rezervaj partoj estas permesita nur al personoj ktp., al kiuj la regna telegrafadministracio donis aprobon kaj tiuj, kiuj legitimas pri tio per prezento de la „aprob-atesto“ montranta iliajn nomojn kaj loĝejon. Tiu ĉi dokumento estas laŭdeze eldonata al la partoprenanto de la telegraf-

oficejo, kiu troviĝas ĉe lia loĝloko, laŭ ekzameno de fiksiataj antaŭkondiĉoj. Intertempe oni fiksis la jarkotizon por privataj personoj je 60 markoj jare, por profesiaj reprezentantoj (revendistoj) je 300 markoj jare, por profesiaj reprezentantoj en katejoj, bufejoj je 600 markoj jare. En tiu ĉi prezo estas enalkalkulitaj la de la entreprenistoj transdonataj pagoj por la prezentado de instruiga kaj amuziga materialoj.

La pago de tiuj ĉi kotizoj estas la komprenebla antaŭkondiĉo por la efektivigo de la plano. Laŭ nombro de la partoprenantoj dependos la alieco de la unuopaj kotizoj kaj de la sumo de la enkasigitaj kotizoj la boneco de la programoj kaj laste la sorto de la sendrata radiotelefono. Okazaj gastioj kaj radioamatoroj ne havantaj permeson endangerigas la sendratan radiotelefonon, kiu estas bazita sur la honesta principo de valoro kaj samvaloroj. Se ne estas dezirata, ke la radiotelefono baldaŭ ĉesu pro manko de sufiĉaj monrimedoj, la regna telegrafadministracio devas zorgi pri tio, ke ne ankaŭ en Germanujo ekelsiĝu la stato, kiu endangerigas la anglan brokdekastadon, ke nur malmultaj partoprenantoj de „Rundfunk“ pagas kaj multe da telekomataj „radioamatoroj“ kunadas nepagante la kotizojn. La en lasta tempo multope esprimita opinio, ke oni nur permesu al la „amatoroj“ la ricevadon, ĉar ili ne ĝenas la ĝuon de la partoprenanto de „Rundfunk“, sekve devas esti nepre batajata, ĉar ĝia aprobo signifus nenion alian ol la finon de la germana „Rundfunk“.

La regna telegrafadministracio por la eldono de koncilio-atestoj por riceviloj de „Rundfunk“ prenas sur sin nenian garantion pri la liverado de sciigoj al la instalaĵoj. Same al perantaj komercistoj rajte povas esti fordondataj nur riceviloj de „Rundfunk“, kiuj respondas al la kondiĉoj. Krome la fondono rajte povas okazi nur al tiuj perantaj komercistoj, kiuj posedas unu de la regna telegrafadministracie eldonitajn „koncilian atestojn“, ke ili estas alasataj por la vendado de tiuj aparatoj. Estas permesataj oferti kaj vendi por Germanujo nur funkciantajn ricevilojn kaj rezervajn partojn por akcesoratoj, kiuj eluzigas kaj cetero devas respondi al la postulataj kondiĉoj. La apogo de klupoj por memkonstruo de ricev-aparatoj per ofertado kaj vendado de unuopaj partoj (amator-konstruistoj) estas malpermesata. Kompreneble per tio neniel devas esti malhelpata la laŭleĝa komerco je radioaparata-

roj al la eksportkomerco: ĉi tie sufiĉos, se ekzemple okaze de anoncoj pri tiuj aparatoj estos atentigita pri tio, ke la ofertitaj aparatoj kaj akcesoratoj ne estas permesataj por la germana „Rundfunk“-interligiĝo, sed nur estas destinitaj por la eksporto.

Se ĉe la sendrata servo priekonomia la regna telegrafadministracio mem liveras kaj starigas la instalaĵojn inkluzive anteno — tiu ĉi instalaĵo estas propraĵo de la regna telegrafadministracio same kiel normala telefonaparataro kun konduktilaroj — la partoprenanto de la instruiga kaj amuziga „Rundfunk“ devas mem starigi aŭ igi starigi la instalaĵojn.

La instruiga kaj amuziga „Rundfunk“ unue je la 29. 10. 1923 estas funkcigita prove kaj je limigita amplekso por la en la „Vox-domo“ Berlin troviĝanta sendilo de la regna telegrafadministracio. Tiu ĉi sendilo provizas teritorion de proksimume 150 km, tiel ke partoprenanto en la tutaj 4 distriktoj de la supera poŝtadirekcio Berlin, Frankfurt-Oder kaj Poisdam povas partopreni kaj partoprenantoj en la limdistriktoj en la partoj kiuj estas situataj en la direkto al Berlin ĉe uzado de bonaj aparatoj.

Okaze de la prezentado de la „Rundfunk“ al la reprezentantoj de la gazetaro la 15. 10. 1923 en la telegrafteknika regna oficejo ŝtatestretario Dr. Bredow esprimis en sia enkondukita parolado, ke en tempo de plej malfacilia ekonomia mizero kaj politika premo la „Rundfunk“ estas permesata por la ĝenerala publiko por alporti al la germana popolo helpe de tiu ĉi kulturprogreso iom da insulo kaj ĝojo en la vivon. Mi povas esperi, ke la ĉi-supre malfonge skizita organizo de la „Rundfunk“ montrigos vivebla kaj kondukos ne nur al plia disvolvigo de la germana radiotelegrafio sed ankaŭ disvolvigo je ĝojo por la radioamatoroj kaj je nova forto de enspezoj por la regno.

Tradukis Willy Heinze.

Gesamsideanoj atentu! Ĉiuj, kiuj estas legitaj tian ĉi artikolon, bonvolu sendi al suba adreso ordinaran poŝtkarton, por povi prui al la neesperantista aŭtoro de tiu ĉi artikolo la valoron de Esperanto per fakto. Mi promesas sendi al ĉiuj respondantoj almenaŭ unu belan karton ilustritan. La sumo de alvontitaj respondoj mi sciigos en ET. Plej bone estas kompreneble, se tiu fakulo tradukas tiu ĉi artikolon nacilingvan kaj presigas ĝin en nacian faklan gazeton. Gesamsideanoj, helpu min por nia komuna afero! — Adreso: S-o Willy Heinze, elektro-inĝeniero, Oberlössnitz-Dresden, Saksujo, Bismarckstr. 29, Germ.

## Radio en Usono.

En tuta Usono oni dum februaro aŭdis programojn el London. Oni kalkulas, ke tri milionoj da personoj aŭdis la rakontojn, kantojn ktp. Ĉion ĉi oni faris pere de helpo de American Telephone and Telegraph Co. kaj pere de sistemo de redissendado per stacioj ĉe New York, Chicago, Omaha, Salt Lake City kaj San Francisco.

Poste oni penis sendi programon de Los Angeles al London, sed pro teknikaj kaŭzoj en Los Angeles ĝi ne tiel bone sukcesis.

En la nokto de 8 februaro oni organizis Usonian programon uzante dudek kvar staciojn en Usono kaj unu en Kubo. Oni komencis vokante la nomon de ĉiu stacio, kaj ĉiu stacio respondis mallonge, donante informon pri la vetero kaj salutojn.

La tutan aferon prezidis estro en Chicago, kaj oni havis programon de violonĉelo en Kubo kaj de sonoriloj en San Francisco krom kantoj el aliaj stacioj. Poste ĉiu stacio adiaŭis.

Ĉio ĉi nur estas komenco de gravaj eksperimentoj kaj montras la vojon al tuteŭropa entrepreno en tia programo sendube pere de Esperanto-parolado aŭ klarigo.

Ankaŭ ĉi tio montras al la skribanto la pli efikan servon kaj pli rapidan antaŭenigon de tiuj aferoj pere de privata posedo kaj ekspluato ol de ŝtata kontrolo kaj ekspluato de telefonoj kaj telegrafoj. Min surprizis legi antaŭ nelonge, ke Germanujo samkiel Holando kaj Anglujo kaj aliaj eŭropaj nacioj ne permesas la liberan ekspluaton kaj uzon de la radio.

Mi rimarku, ke Usono posedas pli da radio-aŭdiloj, pli da telefonoj, pli da telegrafolinioj laŭ nombro da enloĝantoj ol la cetera mondo. Kiam ain oni mencias „privata ekspluato“, ni memoru, ke tiuj ĉi sistemoj ne estas posedataj de kelkaj riĉuloj, sed de centmiloj da akciuloj. La American Telephone and Telegraph Co. havas pli ol 247 000 akciulojn krom tiuj aliajn milojn da posedantoj de obligacioj. Kaj tio nur estas unu kompanio. Ĉiuj estas sub ŝtatkontrolo rilate al tarifoj ktp. Tiuj ĉi kompanioj samkiel aliaj kompanioj kiuj servas la publikon havas la jenajn celojn: (1) Bona, rapida kaj nemultkosta servo, (2) ke iu persono povas telefoni al iu alia persono (rilate al telefonkompanio), (3) ke la dungintoj donu bonan laboron por bona salajro (kaj ĉiuj krom la direktoraro estas dungitaj), (4) ke la uzantoj de ĝiaj servoj kaj la dungitoj estu akciposedantoj de la kompanio. La unuaj tri jam efektive realiĝis kaj la kvara malrapide, sed certe realiĝas. Kaj kiam okazos tio, la entreprenoj estos posedataj de la tuta popolo. Ni tiam vere havos komunajn entreprenojn kies profitoj estos dividataj inter la dungitaro, konsumantaro kaj gvidantaro.

S-o Herbert Hoover, Sekretario de Komercio en Washington, kontraŭstaras la proponon de iuj parlamentanoj, ke oni starigu imposton por la uzo de Radioaŭdiloj. A. S. Vinzent, San Francisco.

## Radiotelefonio en la juro de diversaj ŝtatoj.\*

En Italujo la organizado kaj realigo de interrilatoj per elektromagnetaj ondoj sen apliko de metalaj interkonduktiloj estas ekskluziva rajto de la ŝtato. La posedantoj de instalaĵoj servantaj nur por la akceptado de sciigoj sendrate disigitaj por la privata uzado bezonas koncesion de la ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj. Dependaj de la speco de la aparato 60—240 litroj estas la kostoj por la permeso de la konstruado kaj praktikado de akceptaparatoj por ĝeneralaj radiotelegramoj. Por la disvastigo de tiaj antaŭ nelonge estas fondita privata societo, kiu intencas baldaŭ komenci sian agadon.

En Jugoslavio laŭ reskripto de la poŝt-kaj telegrafministerio la rajton starigi kaj funkciigi akceptilon havas ĉiu, kiu aprobas la kondiĉojn kaj pagas ĉiujare 240 dinarojn (por kadro-ricevilo) aŭ 360 dinarojn por ricevilo kun antero senkadra. La posedantoj estas devigataj akcepti nur sciigojn destinatajn por la publiko (komunikaciajn meteorologiajn, borsajn, gazetarajn kaj koncertojn, operojn ktp.) kaj atenti la telegrafan sekretecon. La transigo de akceptitaj sciigoj al aliaj personoj — pagate aŭ nepagate — estas malpermesita.

En Rusujo la popolkomisaro por poŝto kaj telegrafo intencas permesi por sciencaj kaj kulturaj celoj la konstruadon kaj funkciigon de radiotelefonoj per ŝtataj institutoj kaj ankaŭ per profesiaj kaj partiaj organizaĵoj. Estas intencata la permesado de ricevarapatoj por ĝeneralaj telegramoj, sed oni devos apliki por la instalaĵoj radiotelefonojn fabrikatajn en Rusujo kaj ilin uzigi per speciala personaro koncesita per la ŝtato. Krome en Moskva estos aranĝataj diversaj riceviloj provizotaj per laŭtigiloj por samtempe aŭdigi al grandeta aŭskultantaro paroladojn sendrate disvastigitajn kaj tiel povi prezenti ankaŭ al senhavuloj sendratajn koncertojn.

\* Komparu ankaŭ artikolon en n-o 174. (13. 1. 24.)

Pli multe ol 800 sendiloj, inter kiuj 11 grandaj nur en New York, ekzistis antaŭ nelonge en Usono. Sed laŭ la lastaj sciigoj venintaj al ni de Ameriko la grandega itea ekspansio de la radiotelefono pro manko de ĝusta organizo de la interrilatoj kaŭzis tiom ĝenajn malhelpadojn reciprokajn, ke eĉ la amatoroj nun malaprobas la libecon iam de ili tiom bonvenigitajn kaj postulis rapidegan reguligon de la radiotelefono. La registaro laŭ tio intervenis kaj forigis la plej gravajn malbonkonsekvencojn. La nombro de la sendiloj estas malpliigita je proksimume la duono. (ĉ. 450).

En Ned. Hindujo antaŭ nelonge la ricevado de sciigoj sendrate dissenditaj por privatuloj estas malpermesita; la registaro jam komencis konfiski privatajn ricevilojn.

El: Illustr. Radio Zig., München.  
Trad. D-o Fr. Fr. Franke, München.

## Radiotelefono kaj esperantistoj.

Esperanto estas lingvo „por ĉiuj“, radiotelefono estas ilo por komuniĝi „kun ĉiuj“. Ili kvazaŭ kompletigas unu la alian, kaj tamen inter la esperantistaro la radiotelefono estas ankoraŭ nemulte konata. Tio ĉi estas des pli bedaŭrinda, ĉar nun de tempo al tempo okazas en diversaj landoj radiotelefonaj prelegoj kaj paroloj en Esperanto, sed ilia esperantista aŭskultantaro estas ankoraŭ tre malgranda. Estas tamen tre facile tion ĉi ŝanĝi. Efektive uzo kaj konstruo de radiotelefono estas tiel simpla kaj nemultekosta, ke ĉiu povas aĉeti aŭ eĉ konstrui mem la radiotelefonan ricevilon, kiu donas la eblon senpere ricevadi el la tuta mondo novaĵojn, aŭskulti koncertojn, teatraĵojn, prelegojn en plej diversaj lingvoj ktp. Por la esperantistaro la radiotelefono povas fari tre gravajn servojn dum la tutmondaj esperantaj kongresoj. Revo de ĉiu sameano estas partopreno en la kongreso, sed nur tre malmultaj povas tiun ĉi revon efektiviĝi. Sed ĝuste tie ĉi povas helpi la radiotelefono. Sufiĉos starigi en kongresaj ejoj la konvenajn radiotelefonajn aparatojn, kaj ĉiu esperanta grupo aŭ aparta esperantisto kompreneble posedante radiorecevilon povos en la plej malproksima loko de tergloba aŭskulti ĉion okazantan dum la kongreso. Ĉu do ne estas devo de ĉiu esperantisto ekinteresiĝi tuj pri la radiotekniko, por ke la solena malferma parolado de la proksima tutmonda esperanta kongreso havu esperantistan aŭdiantaron en la tuta mondo?

A. Hajkis, nuntempe Berlin-Charlottenburg.

## Negocaj informoj.

Al nia hodiaŭa numero estas aldonita prospekto de la Internacia Esperantista Interŝanĝo-Klubo en Coblenz. Ni petas niajn legantojn pri atento al ĝi. Ni plue atentigas je la anonco de la klubo sur paĝo 4.

## Esperanto kiel internacia radio-lingvo.

Kunlaboru kaj varbu, abonu kaj anoncu je la

peresperanta, poresperanta  
Internacia Radio-Revuo

## Radio-Servo

Ilustrita monata organo por la tutmonda Radio-Industrio, -komercio, -tekniko, -scienco, -arto.

Interligilo por la Internacia Radio-Asociaro, por la Radio-Klubo kaj Radio-Interesuloj de ĉiuj landoj kaj lingvoj.

Jara abonprezo por 12 numeroj: 1,25 dol. (po numero: 0,10 dol.) aŭ ties ekvivalento.

Centra Oficejo kaj Eldonejo:

## „Radio-Servo“, Locarno (Svislando).

Bank-Konto: Unione di Banche Svizzere, Locarno.  
Telegrafa adreso: Radio-Servo, Locarno.

## Novaj tempoj.

Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, perlaboran lernejon kaj pereduknan pacon. Petu specimenon de:

## M. Goldberg, Leipzig-Co.

Klemmsir. 14 Klemmsir. 14

**Membroj en pli ol 40 landoj**

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., papieronon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postulu prospekton.

**Fr. Jacobi,**  
Bahnhofstrasse 29,  
Coblenz - Germanujo

## 60 famaj pentraĵoj el muzeo de „Louvre“ en Paris.

Arteldonejo de s-o L. G. Patras laŭ formato 19x25 cm. kompilita de s-o Henri Verne, ĉefsekretario de la direkco de la francaj naciaj muzeoj. - Lingva teksto franca, angla, hispana, esperanta.

Prezo: broŝurita 55 fr. fk.  
kalikote bindita 65 fr. fk.  
lede bindita 80 fr. fk.

Mendebila kontraŭ antaŭpago kun 4 fr. fk. por sendokosto. Ĉiu mendo ricevota kun la jena anonco favore nepagos la sendokoston. Sin turnu al s-o

### Delanoue,

ĉefdelegito de UEA,

Paris XIV, 4 rue Charles Dinty.

## Anoncoj.

Anoncoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propraĵa anoncoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.- mk., prefera prezo por postabonantoj 1,25 mk. Anoncoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

90-JARA NASKIĜTAGO. La patrino de nia s-ano Ferd. Kaulfers en Franzendorf, Ĉsl., festis la 18 aprilo 1924 la 90-an datrevenon de sia naskiĝtago. [1]

MAJAJ COLLIN-FESTO. La nunjara, jam fame konata, okazos dimanĉon la 18 majo. Labora kunsido je la 10 h., komuna tagmanĝo, plezuraj kunsidoj je la 2 n. Vin atendas belega migrado, alparoladoj, muziko, teatraĵo ktp. Kore invitas la Esp. Societo, Oschatz (Germ.) [1]

GEESPERANTISTOJ, ATENTU! Mi aranĝas murbildan internacian ekspozicion kaj vin petas, tuj sendi al mi la diversspecajn murbildojn, kiuj havas pli grandan disvastigon inter viaj popoloj, kiuj estas kuninstrua praktika sceno por pli multe da homoj. Karikaturoj, simbolaĵoj ktp. mi ankaŭ deziras. La tekstojn oni traduku esperante. Al la sendinto de ĉiu bildo mi danke respondos kaj sendos bulgaran originalan egalvaloran. 10 bildoj mi premios po 200 levojn (al la sendinto). Adreso D. Popov, artisto, str. Venelin 24, Sofia, Bulgario. [1]

GRAVA POR GRUPOJ KAJ LIBREJOJ. Vi povas akiri malkarpreze ĉirkaŭ 1000 ekz. librojn esp. de famaj aŭtoroj, kiel Zamenhof, Kabe, Grabowski k. a., nome: Mia Liro, Nova Antologio, En fumego de opio, Sinjoro Tadeo, El Parnaso de Popoloj, Al Mokantio, Plena Verkaro, Presias kaj Laodamin. La ĝemo de la Viro, Gueto da Lakto, lenolibroj por poloj, por hebreoj en jida, kaj antikva lingvo hebrea k. m. a. Preferinde oni sendus la tutajn. Propozonon oni povas direkti pere de s-o A. Oberroman, Krak-Prezdem, 10, Warszawa, Polujo. [2]

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Fraŭlo Bořšo Slavko, gimnazisto, Darnavar Jugoslavio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. PK, PM. [1]

S-o Rud. Scholz, Königstr 9, Düsseldorf (Rheinl.), Germanujo, deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj. Responduj tuj. [1]

Filatelistoj! Por 5 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas 60-70 diversajn hungarajn PM. Mi interŝanĝas il. PK. PM kaj papieronon Adreso: Jozefo Toth, Tolna, megye u. p. Pincehelyi Martinka puztia, Hungario. [1]

Por propagandaj celoj mi bezonas esperante skribitajn il. PK el ĉiuj landoj. Mi petas ĉiulandajn samideanojn skribi al mi je adreso: Stanislaw Folman, Panska n-o 13-a, m. 3., Warszawa, Polujo. [1]

Membroj de esperantista grupo deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Korespondadon oni sendu al sekretario: A. D. Borisoglebskij, Bolsaja 76, Blagoveĉensk, Siberio, Rusujo. [1]

Interŝanĝas kun eksterŝtataj landoj helajn il. PK pri urbo, naturo, originalaj kostumoj; afranku filateloj sur bildflanko. Respondas certe. S-o Fernando Zacche, Ponte Molini, Mantova, Italujo. [2]

Hungara maristo serĉas korespondinterilatojn kun maristoj kaj perfekteĝis gesamideanoj ĉiulandaj. Adreso: Atlantica Ltd. S. S. „Balaton“, s-o Porcsin Jozsef, 5, East India Av., London E. C. 3, Britujo. [2]

Fraŭlo D. Dambrauskas, Vilkišk. k. Kurtavenaj, Šiauliai, Litovio, deziras korespondi kun fratinojn 17—35 jar. en la tuta mondo per L kaj PK. Tuj responduj. [2]

20 gesamideanoj deziras korespondi per il. PK kaj L kaj interŝanĝo de PM kun ĉiuj landoj. Skribu al Friŝ Hempel, Schaelstr. 10, Waldenburg (Schl.), Germanujo. [2]

S-o Wilhelm André, Salinenstr. 33, komercisto, Bad-Kreuznach, Rejnlando, Germanujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo. Ĉiam responduj. [2]

Jozef Hrabě, inspektoro de la asekura instituto, Palackého 61, Praha-Vinohrady, Ĉeĥoslovakio, proponas interŝanĝon de PM kaj il. PK kun la tuta mondo. Mi responduj certe kaj senprokraste. [2]